

# La Simbolo de Kristo

Prezidanto Gordon B. Hinckley  
Unua Konsilanto de la Unua Prezidentaro, Aprilo 1975

Kiam nova templo estas preta por uzo aŭ kiam jam ekzistanta templo estas renovigita, laŭ kutimo, antaŭ ol ĝi estas konsekrita, unu tago aŭ unu semajno de "malfermaj pordoj" estas fiksita kaj ĉiuj, kiuj volas vidi la internon de la bela konstruaĵo estas invitaj.

Mi memoras tian semajnon de malfermaj pordoj, kiam pli ol kvaronmiliono da vizitantoj venis. La unuan tagon, estis invititaj kiel honoraj gastoj predikantoj kaj pastroj de aliaj eklezioj, kaj centoj da ili akceptis la inviton. Mi havis la honoron paroli al ili kaj post la vizito respondi al iliaj demandoj. Mi diris, ke ni ĝoje pritraktos ĉiun demandon, kiun ili faros. Estis multe da demandoj, el inter ili ankaŭ la sekva de protestanta kleriko.

Li diris: "Mi jam vizitis la tutan konstruaĵon - ĉi tiu templo super kies eniro staras la nomo de Jesuo Kristo. Sed mi nenie vidis krucon, la simbolo de la kristanaro, kial ne?"

Mi respondis: "Mi ne volas ofendi iun ajn el miaj kristanaj fratoj, sed por ni, la kruco estas simbolo de la mortanta Kristo. Ni prefere proklamas la vivantan Kriston."

Tiam li demandis: "Se vi ne uzas la krucon, kia simbolo ekzistas por via religio?"

Mi donis la respondon, ke la sola signifoplena esprimo de nia fido kaj tiel la sola simbolo de nia adorado de Dio estas la vivoj de niaj membroj.

La Eklezio oficiale nomiĝas la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Ni adoras Kriston kiel nian Sinjoron kaj Elaĉetanton. La Biblio estas nia Sankta Skribo. Ni kredas, ke la profetoj de la Malnova Testamento, kiuj antaŭdiris la alvenon de la Mesio parolis kun Dia inspiro. Ni alte estimas la raportojn de Mateo, Marko, Luko kaj Johano, en kiuj la naskiĝo, la spirita pastrado, la morto kaj la releviĝo de la Solenaskita Filo de Dio estas priskribitaj. Kiel Paŭlo de pasinta epoko, ni ne hontas pri la Evangelio: "...ĉar ĝi estas la potenco de Dio al savo por ĉiu..." (Romanoj 1:16). Kaj kun Petro ni deklaras, ke "...ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas savitaj..." (La Agoj 4:12).

La Libro de Mormon, kiun ni rigardas kiel Ateston de la Nova Mondo, enhavas la instruojn de la profetoj, kiuj loĝis antike en la okcidenta duonsfero. Ĝi estas atesto pri Kristo, kiu naskiĝis en Bet-Lehem kaj mortis sur Golgota. Nia mondo, kun malfortiĝanta fido havas alian fortan ateston pri la Dieco de Kristo. La antaŭparolo, kiun faris profeto, kiu vivis en Ameriko antaŭ pli ol jarmilo, parolis, kiel estis skribite: "Ankaŭ por konvinki la judojn kaj la nejudojn, ke Jesuo estas la Kristo, la Eterna Dio, sin montrante al ĉiuj nacioj."

En nia kolekto de novaj revelacioj, la libro "Doktrino kaj Interligoj", Kristo klare konigas sin

per la jenaj vortoj: "Mi estas Alfa kaj Omega, Kristo, la Sinjoro; jes eĉ mi estas li, la komenco kaj la fino, la Elaĉetanto de la mondo" (Doktrino kaj Interligoj 19:1).

Surbaze de ĉiuj revelacioj kaj atestoj, eble multe da personoj faras la saman demandon, kiel tiu kleriko: "Se ili pretendas, ke ili kredas en Kristo, kial ili ne uzas la memorigilon de lia morto, la Kruco de Golgoto?"

Responde al tio, mi unue diru, ke neniu membro de ĉi tiu Eklezio forgesu, kian teruran prezon la Elaĉetanto pagis, kiu donis sian vivon por ke ĉiuj povu vivi: la suferoj en Getsemane, la amara malestimo de la prijuĝo, la brutala dornkrono, kiu disŝiris lian karnon, la sangavidaj krioj de la popolamaso antaŭ Pilato, la peza ŝarĝo sur la malfacila vojo al Golgoto, la timiga doloro, kiam grandaj najloj traboris liajn manojn kaj piedojn, la febra torturo, kiam li je tiu tragika tago pendis sur la kruco, kiam li, la Filo de Dio, elkriis: "Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras." (Luko 23:34).

Tio estis la kruco - mortigilo, terura ilo por detrui tiun pri kiu oni diris "li estos la paco", la malvirta rekompenco por tio, ke li faris miraklojn kaj sanigis malsanulojn, donis vidpovon al blinduloj kaj vekis mortintojn al vivo. Tio estis la kruco sur la soleca monteto Golgoto, la kruco sur kiu li pendis kaj mortis.

Ni ne povas forgesi tion. Ni ne devas forgesi ĝin, ĉar ĉi tie nia Elaĉetanto, nia Redemptanto, la Filo de Dio oferis sin por ĉiuj ni. Tamen, la impresoj de tiu malluma tago antaŭ la juda sabato, kiam lia senviva korpo estis forprenita de la kruco kaj rapide kuŝigita en pruntedonita tombo, ŝtelis ĉiun esperon eĉ de liaj disĉiploj, kiuj estis la plej fidelaj al li kaj kiuj posedis la pli multon da kono. Ili malĝojis kaj ne komprenis tion, kion li antaŭe diris al ili. La Mesio, en kiu ili kredis, estis morta. La Sinjoro, al kiu ili direktis ĉiujn siajn dezirojn, sian fidon, sian esperon, estis for. Li, kiu pri la eterna vivo parolis kaj vekis Lazaron el la morto, estis sammaniere venkita de la morto kiel ĉiuj aliaj homoj antaŭ li. Finita estis lia mallonga dolora vivo - la vivo de la Sinjoro, pri kiu Jesaja skribis multe da jaroj antaŭe, ke "li estis malestimata kaj evitata de homoj, viro suferanta kaj malsana."

"Li estis vundita pro niaj pekoj, disprenita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis. (Vidu Jesaja 43:3,5.) Nun li estis for.

Ni nur povas provi imagi tion, kion tiuj, kiuj lin amis, sentis, kiam je la juda sabato, sabato laŭ nia kalendaro, ili pripensis dum pluraj horoj lian morton.

Tiam, aŭroris la unua tago de la semajno, la Sabato de la Sinjoro, kiel ni ĝin nomas. Kiam la homoj, kiuj estis subpremitaj de malĝojo alvenis al la tombo anĝelo, kiu tie gardostaris, demandis: "Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis." (Luko 24:5,6.)

Tio estis la plej granda miraklo en la historio de la homaro. Antaŭe li diris "Mi estas la releviĝo kaj la vivo." (Johano 11:25.) Ili ne komprenas tion. Nun ili sciis ĝin. Li estis

suferanta kaj dolorplena kaj mortis sola. Nun, je la tria tago, li releviĝis en gloro kaj potenco kiel la unua el inter la dormantoj kaj donacis al ĉiuj homoj de ĉiuj epokoj la certecon, ke "ĉar kiel en Adam ĉiuj mortas, tiel same ankaŭ en Kristo ĉiuj estos vivigitaj." (I Korintanoj 15:22)

Sur Golgoto estis la mortanta Jesuo. Kiel la vivanta Kristo, li eliris la tombon. La malplena tombo estis atesto, ke li estas Dio; ekzistas espero pri la eterna vivo kaj respondo al la demando de Ijob: "Kiam homo mortas, ĉu li poste povas reviviĝi?" (Ijob 14:14.)

Se li nur mortus, eble li estus forgesita. Eble oni rememorus lin kiel grandan instruiston, kies vivlaboro estis rakontita en kelkaj kolektoj de historiaj libroj. Tamen, kiel releviĝinto, li fariĝis la Sinjoro de la Vivo. Liaj disĉiploj, kiuj pleniĝis de firma fido, povis kun Jesaja kanti: "kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco, Princo de Paco." (Jesaja 9:6.)

La esperplenaj vortoj elparolitaj de Ijob realiĝis: "Sed mi scias, ke mia Liberigonto vivas, kaj fine Li leviĝos super la polvo ... mi vidos Dion; Lin vidos mi, kaj miaj okuloj vidos, ne fremdaj; Pri tio sopiregas mia interno en mia brusto. (Ijob 19:25,27.)

Pro bona kialo kriis Mariia "Roboni!", kiam ŝi unuan fojon vidis la releviĝintan Sinjoron (Johano 20:16.), ĉar nun li estis fakte la Sinjoro kaj Majstro - ne nur super la vivo, sed ankaŭ super la morto. La katenoj de la morto estis rompita, la venko de la tombo konkerita.

Petro, kiu antaŭe estis plena de timo fariĝis nova homo. Vidalvide al la nekontestebla vereco, eĉ la dubanta Tomaso kriis kun adormo "Mia Sinjoro kaj mia Dio!" (Johano 20:28.) "Ne estu nekredema, sed estu kredanta." (Johano 20:27), estis la neforgeseblaj vortoj de la Sinjoro dum ĉi tiuj mirindaj okazintaĵoj.

Poste, li aperis al multaj, eĉ tiel multe, ke Paŭlo skribis "... pli ol kvincent fratoj samtempe" (I Korintanoj 15:6.)

Kaj en la okcidenta duonsfero, kie estis aliaj ŝafoj, pri kiuj li pli frue parolis. La homoj aŭdis voĉon kvazaŭ el la ĉielo; ĝi diris al ili: "Ĉi tiu estas mia Filo, la Amata, en kiu mi havas plezuron, kaj en kiu mi gloras mian nomon - aŭdu lin! ...

Kaj jen, ili vidis Homon malsupreniranta el la ĉielo; kaj li estis vestita per blanka robo; kaj li malsuprenvenis kaj ekstaris meze de ili...

Kaj okazis, ke li etendis sian manon kaj parolis al la popolo, dirante; Jen mi estas Jesuo Kristo, pri kiu la profetoj atestis, ke li venos en la mondon...

Leviĝu kaj venu al mi." (3 Nifai 11: 7-10, 14.)

La Libro de Mormon rakontas per atentokapta maniero vortojn kaj scenojn de la spirita pastrado de la releviĝinta Sinjoro inter la homoj de antikva Ameriko.

Kaj finfine, ni havas la restaŭritan ateston de nia tempo, donitan kiel antaŭdirite, en nia epoko, en la plenumiĝo de tempo, ke li estas la Sinjoro al la tuta homaro. Per glora vizio li aperis, la releviĝinta, vivante Sinjoro kune kun la Patro, la Dio de la Ĉielo, al profeto, kiu estis ankoraŭ tre juna. Ili enkondukis la restarigon de la vero de antikveco. Jozefo Smith, la Profeto de la moderna epoko raportis per la jenaj modestaj vortoj:

"Kaj nun, post la multaj atestoj, kiuj estis donitaj pri li, ĉi tiu estas la lasta de ĉiuj, la ateston, kiun ni donas; Li vivas!

Ĉar ni vidis lin, jes, je la dekstra mano de Dio; kaj ni aŭdis voĉon atesti, ke li estas la Solenaskita Filo de la Patro." (Doktrino kaj Interligoj 76:22,23.)

Nia Elaĉetanto vivas, kaj pro tio ni ne uzas la simbolon de lia morto kiel simbolo de nia fido. Kio devas esti nia simbolo? Nenia elmontraĵo, nenia artaĵo, nenia formala memorigilo povas adekvate esprimi, kiel glora kaj mirinda estas la vivanta Kristo. Tia simbolo, kian ni devas uzi, estis per la jenaj vortoj, ordonita: "Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn." (Johano 14:15)

Tiel simpla estas tio, miaj gefratoj, kaj tiel baza: Tia simbolo pri tio, ke ni proklamas la vivantan Kriston, estas niaj vivoj. Nia vivmaniero devas esti esprimo de nia atesto pri la Eterna Filo kaj vivanta Dio. Ni neniam forgesu tion.

(Tradukita el "Der Stern" marz 1989, Das Christus Symbol, uzata kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.)